**NSiR - Nova Sento in Rete**
**N. 1113 (40/2021)**

Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana

Federazione Esperantista Italiana: posta fei@esperanto.it ; internet http://www.esperanto.it
Itala Esperantista Junularo: posta iej@esperanto.it ; internet http://iej.esperanto.it
Via Villoresi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Norberto Saletti, notiziario@esperanto.it indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"
NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR
I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.
Le lettere non firmate non saranno pubblicate.
Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.

**ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA**
http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm

**LIBRERIA**
http://www.esperanto.it/libri.htm
feilibri@esperanto.it

**INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA**
Il Congresso Nazionale: http://kongreso.esperanto.it
Il Festival Giovanile di Pasqua: http://iej.esperanto.it/ijf

**IL 5 PER MILLE ALLA FEI**
Indicate il codice fiscale **80095770014** nella vostra dichiarazione dei redditi, realizzeremo grandi progetti!

Indice articoli

- Mesaĝo de UEA okaze de la Tago de UNO ........ 2
- Esami, passati e futuri ........ 3
- Kongresi en Breŝo ........ 3
- Azia Seminario ........ 4
- Reprezentanto de UEA inter la ĉefaj parolantoj e CoNGO ........ 4
- Konkursoj! ........ 5
- Spigolature ........ 6
- Volete un quadro di LLZ? ........ 6
- Eh, tio ne okazus, se oni uzus esperanton ........ 7

## MESAĜO DE UEA OKAZE DE LA TAGO DE UNUIĜINTAJ NACIOJ, 24 OKTOBRO 2021




La 24-an de oktobro 2021, ni festas 76 jarojn de Unuiĝintaj Nacioj, la plej ampleksa internacia organizo, la plej ambicia elpaŝo por internacia diplomatio kaj nuntempe la plej grava institucio por trovi kaj antaŭenigi tutmondajn solvojn por tutmondaj problemoj.

La nuntempaj defioj, ekde klimatŝanĝiĝo ĝis genra malegaleco, ekde malpaco ĝis malsato, ekde deviga migrado ĝis maljusta diskriminacio, ekde KOVIM-19 ĝis malsanaj vivkondiĉoj, ekde misinformado ĝis malriĉeco, montras, ke la mondo bezonas multe pli da multflankismo kaj kunlaborado. Kaj por tio ni devas konstrui la UN-on kiun la popoloj de la mondo bezonas.

Konfido kaj solidareco konsistigas esencan vojon por resanigi la mondon kaj konstrui pli bonan estontecon. Ni bonvenigas la vortojn de la Ĝenerala Sekretario António Guterres, en sia Komuna Tagordo, ke ni estas en turnopunkto de la historio: la alpaŝo al pli daŭripova kaj paca estonteco por la popoloj de la mondo kaj por la mondo kiel tuto dependas de ni, la nuna homaro – kaj de niaj decidoj. Post kelkaj tagoj, malfermiĝos en Glasgovo la Konferenco de UN pri Klimatŝanĝiĝo, en kiu oni pridiskutos ne iujn lokajn problemojn aŭ regionajn malfacilaĵojn, nek tutmondajn problemetojn, sed la efektivan estontecon de la planedo kaj, kun ĝi, de la homa specio. Ĉu ĉi-foje, ĉu en tiu ĉi Internacia Jaro de Paco kaj Konfido, UN kaj ties membroj trovos la kuraĝon rekte alfronti tiun demandon? Ĉu la voĉoj de la homoj, en ĉiuj ties lingvoj, estos aŭskultataj de UN kaj la diversaj ŝtatoj?

Ni speciale atentigas pri la fundamenta rolo de lingvoj, en atingo de la Celoj por Daŭripova Evoluigo. Ni bezonas aŭskulti ĉiujn voĉojn kaj paroli kun ĉiuj. Tio eblos nur en mondo en kiu la diversaj lingvoj kaj iliaj parolantoj estos plene respektataj kaj UN praktikos maksimuman multlingvecon kaj elserĉos ĉiujn rimedojn por superi lingvajn barilojn. Diskriminacio kontraŭ unuopaj lingvoj kaj ties parolantoj estas neakceptebla.

La Esperanto-movado, kaj ene de ĝi Universala Esperanto-Asocio, antaŭenigas internacian kunlaboron, komprenemon kaj amikecon. Per la lingvo Esperanto ni disvastigas la mesaĝon de UN al ĉiuj anguloj de la mondo kaj per uzo de la lingvo ni praktikas aŭtentikan tutmondan dialogadon. Esperantistoj aktive partoprenas en internaciaj iniciatoj, kaj Universala Esperanto-Asocio, en sia konsulta statuso kun la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN, klopodas disvastigi, pere de la Internacia Lingvo Esperanto, informojn pri UN, kaj varbi subtenon por ĝi. Ni favoras multlingvismon kaj ankaŭ klopodojn komunikiĝi trans la diversaj lingvoj.

En ĉi tiu tago plena je espero, ni invitas ĉiujn kuniĝi por realigi la celojn de UN: tutmondan pacon, tutmondan aplikon de homaj rajtoj kaj tutmondan daŭripovan evoluigon.

## ESAMI, FUTURI E PASSATI

Si informa che vi sarà una sessione d'esame di I grado a Riva del Garda il 29 ottobre e una sessione di I grado e una di II secondo grado a Trento il 30 ottobre.

Hanno superato esame di secondo grado il giorno 17 ottobre 2021 durante la sessione tenutasi a Pisa:
- RICCARDO BORGIOLI di Firenze
- ENRICO BORRELLO di Massa.

## KONGRESI EN BREŜO

Itala Esperanto-Federacio organizos sian 89-an Kongreson ontjare de la 20-a ĝis -a 27-a de aŭgusto en urbo Breŝo. Por ke vi povu antaŭĝui ĝin vi povas spekti la filmon de la turisma oficejo en esperanto.

Kaj poste ne forgesu viziti la ttt-paĝon kaj aliĝi!

https://kongreso.esperanto.it/89/it/

https://youtu.be/0a_eEqnjqug

## AZIA SEMINARIO

Surrete okazos la 39-a Komuna Seminario inter ĉina, japana, korea kaj vjetnama junularoj kun temo “La okuloj ilin ne vidas, sed…! –kronviruso kaj ni–”. Ĉi-jare Japanio gastigos ĝin. Limdato de aliĝo estas la 5a de Novembro. Ne maltrafu ŝancon partopreni mojosegan internacian renkontiĝon!

https://www.jei.or.jp/eo/komunaseminario2021/

Sur la foto scenoj de preparado por la KSo en Tokia SOJO Esperanto-Vegana Kafejo. (alklaku la foton por vidi la tuton! )

https://www.facebook.com/374039972705749/posts/4241295095980198/

## REPREZENTANTO DE UEA INTER LA ĈEFAJ PAROLANTOJ EN LA PINTKONFERENCO DE *CONGO* (UN), LA 25-AN DE OKTOBRO

CoNGO estas la Konferenco de la Ne-Registaraj Organizoj en Konsulta Statuso kun Unuiĝintaj Nacioj (UN). Ekde 2018 UEA partoprenas en ĝia estraro (https://uea.org/gk/736). Ĉi-jare CoNGO organizas pintkonferencon kunlige kun la nuna sesio de la Ĝenerala Asembleo de UN, kiu celas informi NRO-ojn pri la ĉefaj prioritatoj kaj helpi ilin kune plani kaj kunlabori. UEA estas aparte honorata de la fakto, ke inter la kvar ĉefaj parolantoj estas Francis Hult, unu el la reprezentantoj de UEA ĉe UN. La pintkonferenco okazos lundon, la 25-an de oktobro 2021, inter la 13h00 kaj 20h30 UTC (9h00 kaj 16h30 EDT), ĉeeste en Novjorko kaj rete, per Zoom. La evento okazos per la angla. Interesatoj partopreni rete povas senpage aliĝi. Necesas aparte registriĝi por ĉiu el la diversaj prezentrondoj. Por tio oni bonvolu viziti la retejon de CoNGO: https://bit.ly/3ATUeFz. Ĉiu prezentrondo, inkluzive de la ĉefa, havos sian propran Zoom-ligon. Bonvolu registriĝi en ĉiuj aŭ en tiom da ili laŭ interesiĝo kaj ebloj.

La ĉefa prezentrondo malfermas la pintkonferencon je la 13h00 UTC per bonvenigaj vortoj de la prezidanto de CoNGO, Liberato Bautista. Partoprenos Irina Bokova (antaŭa Ĝenerala Direktoro de Unesko), apud kiu parolos Prof. Francis Hult (Profesoro pri Eduka Lingvistiko ĉe la Universitato de Maryland, Baltimore), aldone al Radhika Coomaraswamy kaj Garry Jacobs. Humphrey Tonkin, Honora Prezidanto de UEA, estas unu el la ĉefraportantoj de la evento, nome de nia Asocio. UEA dankas al Francis Hult kaj al Humphrey Tonkin pro iliaj laboroj kaj al ĉiuj aktivuloj en la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj kaj reprezentantoj de UEA ĉe UN kaj Unesko.

## KONKURSOJ!

Itala Esperanto-Federacio organizas por la jaro 2022 **literaturan tradukkonkurson de la itala al Esperanto**.

La konkurso konsistas el du branĉoj:

**poezio**: maksimuma longo ne fiksita;

**prozo**: (rakonto, novelo) maksimuma longo 13.000 tajperoj.

La komisiono povos asigni ĝis tri premiojn por ĉiu branĉo.

La rezultoj estos anoncataj enkadre de la itala kongreso de Esperanto, en Brescia, dum specifa programero.

Ĉiu persono rajtas konkursi por ĉiu branĉo per maksimume tri verkoj, kies tradukoj devas esti neniam antaŭe eldonitaj per ajna komunikilo (prese, rete, lege, bloge, ktp). La gajnintoj de la unua premio ne rajtas partopreni en la konkurso en la sama branĉo dum la sekvaj tri jaroj.

La konkursaĵojn, kune kun la originaloj, oni sendu al la sekretario, Norberto Saletti, prefere per retmesaĝo, al la adreso concorso@esperanto.it indikante la branĉon, la elektitan pseŭdonimon kaj la efektivan nomon kaj adreson. Se tio ne eblas, oni sendu ilin papere al la adreso

Federazione Esperantista Italiana, via Villoresi 38, 20143 Milano, Italia,

indikante sur la koverto "literatura konkurso" kaj enmetante la kontribuaĵo(j)n kaj la originala(j)n tradukita(j)n verko(j)n sen ajna indiko kaj notante en aparta folio ĉiujn necesajn indikojn kiel supre.

**Premioj**: la gajnintoj de la unua premio de la du branĉoj ricevos akvaforton originale verkitan por la premio Zamenhof; por la aliaj la premio konsistos el esperantlingvaj libroj. La unua premio en la branĉo "poezio" havas titolon "Gaudenzio Pisoni"; la unua premio en la branĉo prozo havas titolon "Lina Gabrielli". La disdono de la premioj okazos dum la koncerna kongresa programero; se premiito ne ĉeestos ĝin, li estos kontaktata pri la livero.

**Limdato** por la sendado estas 30-a de aprilo 2022.

**Juĝkomisionoj**: prezidanto: Michela Lipari, sekretario: Norberto Saletti; por branĉo *poezio*: Giulio Cappa, Anna Maria Dall'Olio, Tiberio Madonna; por branĉo *prozo*: Gabriele Aquilina, Valerio Dalla, Anna Maria Dall'Olio.

La sekretario informos ĝis la 1-a de aŭgusto la gajnintojn pri la premio.

La partoprenantoj cedas senpage al IEF por la unua jaro la rajton je unua publikigo.

Por **pliaj informoj** : concorso@esperanto.it

FEI, concorso, via Villoresi 38, 20143 Milano, Italia

**Regularo konkurso "Ĝanfranko"**

Itala Esperanto-Federacio, por omaĝi Gianfranco Molle, la plej faman italan kantiston, tutmonde konatan, animon de "Muzika Kulturo", decidis organizi konkurson pri kanzonoj originale verkitaj en Esperanto. La komisiono povos asigni ĝis tri premiojn. La rezultoj estos anoncitaj enkadre de la itala kongreso de Esperanto, dum specifa programero.

Ĉiu persono rajtas konkursi per maksimume tri verkoj, kiuj devas esti neniam antaŭe eldonitaj per ajna komunikilo (prese, rete, lege, bloge, ktp). Maksimuma daŭro de kanzono estas 5 minutoj. La gajnintoj de la unua premio ne rajtas partopreni en la konkurso dum la sekvaj tri jaroj. La konkursaĵojn oni sendu al la sekretario, Norberto Saletti, per retmesaĝo, al la adreso concorso@esperanto.it indikante la elektitan pseŭdonimon kaj la efektivan nomon kaj adreson; ili estu kantitaj kaj luditaj en aŭda formato mp3 aŭ ogg, kaj skribitaj (nur vortoj, eventuale kun akordoj) en teksta formato doc aŭ odt.

Premioj: la gajninto de la unua premio, premio Ĝanfranko, ricevos monpremion de 250,00 eŭroj; por la aliaj la premio konsistos el esperantlingvaj KD-oj. Limdato por la sendado estas la 30-a de majo de la koncerna jaro. Juĝkomisiono: prezidanto: Michela Lipari, sekretario Norberto Saletti, juĝantoj: Giulio Cappa, Valerio Dalla, Marcella Fasani. La sekretario informos ĝis la 1-a de aŭgusto la gajnintojn pri la premio. La partoprenantoj cedas senpage al IEF por la unua jaro la rajton je unua publikigo.

Por pliaj informoj : concorso@esperanto.it FEI, concorso, via Villoresi 38, 20143 Milano, Italia

## *SPIGOLATURE*

*(da La Settimana Enigmistica del 7 ottobre 2021)*

L'oftalmologo polacco Ludwik Zamenhof, il padre dell'esperanto, ebbe l'idea di creare una lingua universale già da ragazzo. Era sicuro che un idioma condiviso avrebbe permesso di superare anche le diffidenze e i pregiudizi tra le diverse comunità etno-linguistiche della sua città, Bialystok ( oggi in Polonia e allora nell'impero russo), dove si parlavano diverse lingue, tra le quali il polacco,lo yiddish, il bielorusso e il tedesco.

## VOLETE UN QUADRO DI LLZ?

Vi propongo questo quadro molto grande di Zamenhof (92 x 74). Il pregio di questo quadro è la cornice molto bella e molto antica, però il ritratto di Zamenhof è un ingrandimento fotografico. È in regalo per chi la vuole, però consiglio di non spedire per posta, perché costerebbe caro e potrebbe anche rovinarsi, venite da

me con una macchina è più semplice. Ogni circolo esperantista dovrebbe avere un ritratto di Zamenhof: nella nostra sede ne abbiamo già tre.
Scrivetemi o telefonatemi.
Gianni Conti
Cell. 339 6315211



## EH, TIO NE OKAZUS, SE ONI UZUS ESPERANTON

Jen vera filozofio: “Hodiaŭo estas konstruata. Dankon pro la fakto, ke vi komprenas”. Ne nur la estonton, sed la nuntempon oni devas ankaŭ prizorgi.

